enero 2004

# avanco 1/04

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



# Estrara Raporto pri la agado de Kuba Esperanto-Asocio dum 2003

## ENKONDUKO

Nova jaro pasis kaj denove nia komitato plenkunsidas por pritrakti la plej gravajn temojn kiuj koncernas la vivon de KEA en la nuna periodo. La jaro 2003, kies laborrezultojn ni raportos kaj analizos hodiaŭ, estis signita de multaj obstakloj, taskoj, kunsidoj, malfacilaĵoj kaj defioj kies plenumoj kaj malplenumoj estas markitaj de grandaj streboj kaj kontraŭdiroj. Bedaŭrinde, pluraj aferoj ne marŝis kiel dezirite kaj atendite kaj ĝuste pro tio ni devas kun memkritika kaj kritika spirito, fratece kaj pasie, funde analizi nian laboron en ĉiuj agadkampoj.

Multaj taskoj staras antaŭ ni, pluraj defioj, kiel ezkemple la 6-a Tutamerika Kongreso kies baldaŭa efektiviĝo staras fronte al ni kun pluraj demandosignoj, tamen, ni laboras cele al sukcesa okazigo de tiu ĉi grava evento por la kontinenta movado. Tiu, kaj aliaj ne malpli gravaj taskoj postulas nian dediĉon, paciencon kaj energiojn. Do, ni alfrontu la estontecon kun optimismo malgraŭ multaj obstakloj kiuj certe aperos survoje. Ni konsciu ke la lando travivas, samkiel nia tuta terglobo, malfacilan periodon kaj por multaj homoj Esperanto devus ĉiam reprezenti alternativon de espero, do, ni devos eltrovi elirvojon kaj solvojn praktikajn al la pluraj problemoj de la ĉiutaga vivo kun nia plej alta celo disvastigi Esperanton kaj plifortigi nian movadon. Kun tia spirito ni laboru hodiaŭ!

## 1. Prezidantino

Dum la jaro ni prezidis la ordinarajn kunsidojn de la nacia estraro, kies efektiviĝo estis akurata escepte en oktobro, kiam la kunsido okazis kun granda prokrasto, sed ĉiuj ordinaraj kunsidoj estis faritaj, plus aliaj de la preparkomitato de la tutamerika kongreso okazonta venontmarte. Pri ĉi-kongresaj preparlaboroj ni raportos kadre de la koncerna tagordero.

## 2. Publikaj rilatoj

Dum la jaro la asocio daŭre flegis siajn rilatojn kun diversaj institucioj. La rilatoj kun MINCUL regule okazis kun la Departemento de Asocioj, specife pri kulturaj programoj por pritrakti la planon de eventoj 2004 kaj aliajn gravajn aspektojn koncerne la vivon de la asocio; en februaro okazis planita kontrolvizito de MINCUL, sekvis kunsidoj ĉe MINCIN, MINCUL kaj MINJUS rilate novajn rezoluciojn pri komerca agado, kio finiĝis per renoviĝo de laborpermesoj.
En aprilo okazis kunsido ĉe MINCUL pri la stato de la laborrilatoj, ili informis sian decidon ne plu roli kiel nia rilatorgano, sed en posta kunsido kun MINJUS restis klare ke tio postulas popaŝan solvon kaj do, la rilatoj restas ĝis nun en tiu sama Ministerio ĝis definitiva solvo kaj decido. En majo ni partoprenis la jaran kunsidon de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) kun la koncerna Viceministro de Kulturo kie estis prezentita raporto pri la agado de KEA enlanda kaj eksterlanda; la kunsido estis pozitiva pro tio ke restis klare antaŭ ĉiuj koncernaj funkciuloj ke nia rilatorgano estas MINCUL. Tamen, dum la jaro ni pli ofte devis dediĉi tempon al kunsidoj kun la juraj specialistoj pri laborpermesoj; la temo de la statutoj, malgraŭ aprobo de la juristoj, estis prokrastita de la rilatorgano ĝis decido pri estonta rilatorgano. Pri tiu ĉi temo ni devas daŭre labori en la nova periodo.

En la kunsido kun NRO-j ni partoprenis analizon pri la rolo de niaj organizaĵoj en la nuna internacia konjunkturo kaj en la kreado de la Kontraŭfaŝisma Fronto. Ni aktive partoprenis

tian alvokon kaj preparis la noton publikigitan en *Granma* pri la sinteno rilate la temon.

En 2003 ni estis kunvokitaj de la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj al kunsido kun la ministro rilate la sintenon de la kubaj NRO-j pri la usona blokado altrudata al la insulo. Sekve ni partoprenis la Forumon de NRO-j kontraŭ la usona blokado sesiinta fine de oktobro en Havano. Ni konsideras ke dum la jaro niaj rilatoj kun MINCUL travivis tiklajn momentojn kiel kulmino de dujara diskutado pri diversaj temoj ne solvitaj, kvankam bedaŭrinde multaj estis pri burokrataĵoj kiuj bremsas pli efektivajn aŭ rapidajn solvojn al niaj demandoj. Tamen, la rilatoj evoluas sub deca nivelo, kvankam ne kontentiga por ni.

Aliaj kontaktoj okazis pro nia partopreno en internaciaj kaj naciaj eventoj kiel la Havana Librofoiro komence de la jaro, kiu ĉifoje etendiĝis al Santiago de Cuba, Ciego de Ávila kaj Holguín.

Dum tiu ĉi jaro niaj kontaktoj kun ICAP restis stabilaj danke al la plua efektiviĝo de la solidara agado de la Amikoj de Kubo en Belgio.

### 3. Internaciaj rilatoj

Dum la jaro ni daŭre flegis niajn rilatojn kun UEA per aliĝo al la listoj Landa Agado, Komitato, Amerika Agado kaj Radioj en Esperanto. Per tiuj listoj internaciaj, regule ni informas pri



*Kritikaj analizoj de la laboro dum la komitataj laborkunsidoj. De maldekstre: Yoandra Rodríguez kaj Alberto García Fumero (kiuj protokolis), Mariza Gutiérrez González, Prezidantino kaj Juan Ramón Rodríguez Gómez, Ĝenerala Sekretario.* Foto: Alberto F. Calienes.

niaj aranĝoj enlande, kiel la datreveno de KEA, la memortabulo al Julio Mangada Roseñorn en Sancti Spíritus, la evento en Guantánamo kaj aliaj.

La plej bona momento por tio estis nia partopreno en la Komitatkunsido de UEA kaj specife en la subkomitatoj pri Financo kaj Landa Agado kadre de la 88-a UK kaj la 32-a ILEI-konferenco en Svedio. Pri nia agado tie, la komitatanoj ricevis koncernan raporton.

Dum la jaro, pro la laboro en Radio Havano Kubo mi ricevis la inviton partopreni la 90-an Japanan Kongreson kaj prelegi tie pri la rolo de Esperanto en Internaciaj Radioelsendoj. Tiu vizito donis al mi la eblecon diskonigi la agadon ne nur en la radio, sed ankaŭ pri KEA kaj pri la 6-a TAKE. Dum la jaro plue solidiĝis niaj rilatoj kun FEL pere de s-ro Eddy Raats kaj la Amikoj de Kubo, kiuj sendis du grandajn kontenerojn kun materia helpo por pluraj institucioj en la tuta lando.

### 4. 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto

Dum 2003 la preparkomitato de la kongreso daŭrigis sian laboron komencitan en 2002 rilate diversajn demarŝojn por la kongreso. En marto ni kunsidis rilate la estontan kongresejon kaj iniciatis la laboron tiudirekte, krom aliaj gravaj aspektoj pri loĝado kaj simile. En aprilo okazis kunsido pri la kongresa programo, kio ankaŭ okazis en majo, kiam ni sukcesis krei strukturitan skizon de programo.

Ni partoprenis kunsidon ĉe CUBATUR kiu estas la oficiala agentejo de la kongreso kaj faris demarŝojn pri oficiala flugkompanio ĉe COPA; por la UK estis preparita la *Dua Bulteno* de la kongreso kaj el ili oni distribuis pli ol mil dum la kongresa semajno.

Ni kontaktis kun UEA-estraranoj d-ro H. Tonkin kaj s-ino M. Lipari pri ebla partopreno en TAKE. Ni kunsidis kun s-ro Atilio Orellanas rilate la ĝeneralan programon de la evento kaj dum la kunsido de Ameriko estis prezentita la *Dua Bulteno* kaj ni koncize raportis pri la preparlaboroj en Kubo okaze de la kongreso. Pluraj esperantistoj el diversaj eŭropaj landoj ankaŭ montris sian intereson veni al Kubo.

Ĝis nun estas pli ol 20 aliĝintoj plus aliaj interesitoj kiuj pagos surloke, proksimume 50 esperantistoj el 15 landoj jam anoncis sian intencon veni al Havano por la kongreso, krom cento da kubanoj el 11 provincoj plus Insulo de Junularo. Nuntempe la informoj troveblas en la retpaĝo de Amerika Komisiono, en la retpaĝo de Sancti Spíritus kaj konstante ni informas pri la kongreso en la elsendoj de Radio Havano Kubo kaj en la diversaj retlistoj. Ni konstante respondas al retpoŝtaj informpetoj.

### 5. Ĝenerala Sekretario

***Organizaj demandoj kaj interna administrado.*** En 2003, mi multe agadis ĉi-rilate, sed samtempe mia laboro ne estis tiel funda kiel en antaŭaj jaroj. Certe mi preskaŭ faris nenion dum kvar monatoj, pro restado for de la lando kaj lastatempa malsaneco krome mi estis devigata tro okupiĝi pri burokrataj aferoj laŭleĝe, atenti tre malsimilajn aferojn je diversaj flankoj, anstataŭi prezidantinon kaj estraranon pri Financoj inter julio kaj oktobro, ktp, sed mi konscias, ke krom tio, mankis la stabileco kaj sindediĉo bezonataj por entrepreni tiun ampleksan laboron. Veraj rezultoj el tio estas la faktoj ke mi ne konstante kontrolis dokumentojn ricevitajn el filioj, malfrue aranĝis kaj disdonis la protokolojn de la Estraro, preskaŭ forgesis atenton al membroj subtenantoj kaj ne stabiligis la informan fluon kun la komitatanoj.

***Membro-kontrolo kaj kotizo:*** Alifoje, mi multege laboris por havigi al ni ĉiuj la tutlandan membrokontrolon, sed temis pri tasko farita dum tiu ĉi monato, ĉefe pro la fakto ke, kompreneble, temas pri tasko kiu dependas de tio kion oni faras tra la filioj kaj, dum 2003, la plej granda parto de la membrokontroloj (krom la koncernaj kotizoj kaj kotizkvitancoj) alvenis ĉe

ni dum novembro, decembro kaj eĉ januaro.

Vi ĉiuj scias ke, laŭ decido de la 20-a Komitatkunsido, ni planis mezuri la statistikajn rezultojn de la tutlanda laboragado post la fino de oktobro. Tamen, por tion aranĝi ĝustatempe malhelpis mia malsano kaj la malfruiĝo de la senditaj informoj (ankaŭ kun malkongruoj aŭ kun mankoj de kelkaj bezonataj aferoj). Bedaŭrinde, ni esperis ke preskaŭ ĉiuj filioj enspagu jaran kotizon, kio sendube faciligus la laboron je ĉiu instanco, sed okazis male, ĉar la plejmulto aranĝis ĝin semestre, kiel tradicie. Rezulte de tio, ni estis devigataj kontroli la jarajn kaj la semestrajn kotizantojn, eĉ per sendependaj kotizkvitancoj, kio tro komplikas la aferon. Ĉi-rilate ŝajnas, ke la prezidantoj ne bone informis la kasistojn pri la komitata decido, ĉar nur plenumis ĝin: Camagüey, Holguín, Ciego de Ávila kaj Insulo de Junularo. Grava afero estas ke, malgraŭ malplenumi nian decidon, kompare kun 2002, la membronombro kreskis naciskale, eĉ laŭ la kvanto da jaraj kotizantoj. Pliajn detalojn vidu en la suba tabelo.

***Atento kaj vizitoj al filioj.*** Ĉi tie, mi nur ripetas kion mi informis dum la pasinta Komitatkunsido, ĉar tute samas: "Malkontentigas nin la fakto ke, dum la periodo, pro diversaj kialoj, ne eblis al Naciaj Estraranoj viziti la filiojn tiel ofte kiel tradicie. Tio meritas reviglîgon ĉar, pere de tiuj vizitoj, la estraranoj havas la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la surlokaj esperantistoj.

Nur eblis viziti 5 filiojn (Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Camagüey kaj Ciego de Ávila), sed preskaŭ ili ĉiuj estis en rektaj rilatoj kun eventoj (renkontiĝoj, seminarioj, librofoiro). Do, ne estis veraj kontrolvizitoj." En la lasta jaro, ekzemple, mi vizitis 4 filiojn, sed nur por eventoj: Sancti Spíritus (Komitatkunsido), Santiago (Librofoiro kaj Seminario pri Aktivula Trejnado) kaj Ciego de Ávila (Librofoiro). En la kazoj de tiuj ĉi du lastaj, mi baptopatras ilin.

***Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.*** Dum 2003, mi faris nenion en rilato kun la membroj-subtenantoj tra la lando. Tradicie, mi sendas al ili ekzempleron de *Avanco*, sed ankaŭ la apero de nia oficiala organo fiaskis en tiu periodo, kaj ili ricevis nenion miaflanke. Tio vere malhelpas la agadon de la Asocio, ĉar ju pli ni atentos ilin des pli da ili ni havos kaj retenos sub tiu kategorio. Kompreneble, ankaŭ en la filioj oni devas plu stimuli kaj atenti la lokajn membro-subtenantojn.

***Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.*** Rilate la atenton al komitatanoj,

| Filio | Tutjaraj kotizoj | 1-a Sem. | Totalo | 2-a Sem. | Totalo |
|---|---|---|---|---|---|
| Guantánamo | 34 | 11 | 45 | 0 | 34 |
| Santiago de Cuba | 29 | 109 | 138 | 50 | 79 |
| Granma | 119 | 6 | 125 | 0 | 119 |
| Holguín | 33 | 0 | 33 | 0 | 33 |
| Camagüey | 42 | 0 | 42 | 0 | 42 |
| Ciego de Ávila | 10 | 0 | 10 | 0 | 10 |
| Sancti Spíritus | 10 | 2 | 10 | 0 | 10 |
| Isla de la Juventud | 5 | 0 | 5 | 0 | 5 |
| Ciudad de La Habana | 162 | 17 | 179 | 6 | 168 |
| PKK (NE) | 15 | 0 | 15 | 0 | 15 |
| TOTALO | 459 | 143 | 602 | 56 | 515 |

ni kelkfoje kontaktis ilin telefone, persone aŭ letere; kaj, samtempe, la NE sendis ĉiam al ili la monatajn protokolojn. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko.

***Amerika agado.*** Dum 2003, ni daŭrigis regulajn rilatojn kun diversaj landaj, regionaj kaj lokaj asocioj. Bedaŭrinde, ne eblis sendi al ili la asocian organon, kiel jam delonge ni faras. Ofte ankaŭ ni interŝanĝis retpoŝtajn mesaĝojn, ĉefe en rilato kun la 6-a TAKE.

Okaze de mia partopreno en la lasta Internacia Librofoiro en Sankto-Domingo, Dominika Respubliko (aprilo-majo), mi forte propagandis pri Esperanto. Kiel rezulto de tio, aperis kelkaj interesitoj pri la Esperanto en la ĉefurbo, kie mi sukcesis arigi grupon kaj gvidi la unuajn renkontiĝojn. Ili decidis vojaĝigi min tien komence de septembro por okazigi intensivan kurson dum du monatoj, sed tio ne eblis kaj la grupo disiĝis.

***Historio.*** Kiel delonge okazas, la Komisiono pri Historio intense agadis dum la pasinta jaro je diversaj branĉoj kun la dokumentaro ekzistanta ĉe ni. La plej granda parto de mia porasocia laboro dum 2003 estis en direkta rilato kun tiu ĉi afero (pli ol 30 horoj semajne). La laboro de la komisionanoj permesis klasifi kaj kontroli la plejmulton el ĉio, kion iom post iom oni enkomputiligas. Dank' al tio, miaj ĉefaj taskoj nun estas pretigi libreton pri nia historio, aperonta okaze de la 6-a TAKE, kaj aranĝi grandan ekspozicion por la Tutamerika Kongreso.

***Rilatoj kun UN-Asocio, UNESKO-Komisiono, Fondaĵo F. Ortiz kaj Asocio de Lingvistoj.*** En 2003, mi daŭrigis rilatojn kun kelkaj el ili, sed ne tiel fortaj kiel en antaŭaj jaroj.

Ni plurfoje kontaktis kun Asocio de Lingvistoj, pere de ĝia prezidantino, kiu ankaŭ interesiĝas pri prelego(j) de eksterlandaj fakuloj pri Esperanto, temo pri kiu ankaŭ interesiĝas la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko. Tio eblus okaze de la 6-a TAKE, sed tiurilate ni devos pli precize aranĝi ĉion. Ni ankaŭ kontaktis plurfoje kun UN-Asocio, sed ĉefe kiel kolektiva membro de tiu institucio. Inter septembro kaj oktobro, KEA ricevis inviton de la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj, pere de UN-Asocio, por partopreni forumon de la kubaj NRO-j kontraŭ la usona blokado, kio postulis entute ok preparkunsidojn.

Kun la Fondaĵo Fernando Ortiz ekzistas formalaj rilatoj, pro la fakto ke ni povas ion fari en rilato kun Ortiz; sed vere ŝajnas ke ili ne interesiĝas pri la afero; tamen, ni persistos en tiu celo.

Kontraŭdire al tio, mi sukcesis kontakti estrojn de Sociedad Económica de Amigos del País, kaj ĝia organo (*Revista Bimestre Cubana*, kiun gvidis Ortiz dum pluraj jaroj) pretas publikigi artikolojn pri lia agado rilate al Esperanto kaj ĝenerale pri nia historio.

En la kazo de UNESKO-Komisiono, okazis neniu kontakto dum la jaro, kaj sendube ni tuj devas rekontakti ilin, celante proponi alifoje nian Projekton pri la Kariba Regiono, kaj pro la graveco ke iom post iom progresas la rilatoj inter UNESKO kaj Esperanto internaciskale.

***Partopreno en Internaciaj Librofoiroj.*** Laŭ decido de la Nacia Estraro de KEA, alifoje Alberto García Fumero kaj mi estis la respondeculoj pri nia stando en la Internacia Librofoiro Havano '2003, kie ni – kune kun aliaj esperantistoj – havis la ŝancon fari bonan propagandon dum pli ol semajno, kaj konatigi Esperanton al multaj homoj.

Kiel rezulto de nia agado tie pli ol cento da personoj montris specialan intereson por Esperanto, al kiuj poste ni sendis diversajn informojn kaj kelkaj el ili petis aliĝi al la perkorespondа kurso. Poste, mi ankaŭ partoprenis la Librofoiron en Ciego de Ávila kaj Santiago de Cuba.

Ĝenerale, tio rezultis sufiĉe fruktodona kaj montris ke tiu vojo ankaŭ validas por Esperanto, ĉar permesis diverstipajn kontaktojn, kaj la eblecon malfermi novajn pordojn ne esploritajn ĝis nun.

## 6. Estrarano pri Financo

*Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj:* La administraj taskoj plenumitaj dum la jaro koncentriĝis en la plua funkciado, riparado kaj aliaj laboroj de la Nacia Sidejo de KEA, kiu, dum la jaro, plenumis diversajn servojn al interesitoj, vizitantoj kaj esperantistoj en- kaj eksterlandaj. Oni devas ankoraŭ strebi por plibonigi la servojn kaj la fluon de informoj tra la CO.

*Plenumi efike la buĝeton de la KEA-kontoj:* Ni jam petis al la banko havi apartajn kontojn por la 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto en CUP kaj USD; tio estis tre bona sperto de la 4-a Kongreso de KEA ĉar ni povis taksi la verajn elspezojn pro tiu koncepto. Dum la jaro, oni sukcesis garantii la esencajn servojn kaj eventojn planitajn. Rilate al buĝeto, la situacio estis en malbona situacio: ni ne plenumis la buĝeton kaj en CUP kaj en USD. Krom aliaj aferoj influis ankaŭ la perdon de la rajto vendi al la asocianoj manĝeton dum niaj aktivecoj, ankaŭ ni perdis la rajton fari kursojn por la ekterlandanoj kaj havi ekterlandajn asocianojn.

*Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono laŭstatute:* La Komisiono estis kompletigita dum la 20-a Komitatkunsido en Sancti Spíritus per Mario Ruiz Karell, estas ankaŭ membroj de tiu komisiono Jorge L. González Santilián kaj Rafael Cabrera Espinosa; kaj oni sukcesis kunsidigi ilin meze de novembro, kiam oni faris la koncernan financan reviziadon nacinivele kun tre bonaj rezultoj.

*Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.* La filioj sendas la monon pere de BANDEC, kio multe helpas la Asocion ekde administra vidpunkto. La filioj daŭre devas insisti en la banko por meti la nomon de la filio en la atestilo pri la sendado, aŭ sendi la numeron de la kvitanco kiun liveras BANDEC. Preskaŭ ĉiuj filioj sendas la kotizkvitancaron bonorde; sed daŭre aperas malfacilajoj en la provinca filio Urbo Havano. Okazis tri kontroloj al la financoj de Centra Havano, sed la problemoj ne estas solvitaj.

*Kontrakti la servojn de CANEC.* Oni kontraktis tiujn servojn por la reviziado de nia librotenado dum 2003. La laboro estos farita dum februaro 2004. Poste la Komitato estos informita pri la rezulto.

*Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.* Dum la tuta jaro, ni laboradis por pliriĉigi niajn stokojn en la Libroservo per diversaj materialoj, ĉefe kasedoj.

Ni esperas, ke per la nova oferto de Libroservo al la filioj kaj esperantistoj tutlande ĉiu povos akiri librojn laŭplaĉe. Dum tiu ĉi jaro 2004 ni esperas eldoni *Historion de la Esperanto-Movado en Kubo*, kiun momente verkas Juan Ramon, ankaŭ ni ofertos bildkartojn, KD-ojn en Esperanto kaj aliajn esperantaĵojn por la asocianoj.

## 7. Estrarano pri Informado kaj Eldona agado

*Flugfolio* **Ĝisdate pri Esperanto.** Oni preparis eldonon surbaze de la samtitola flugfolio de UEA por disdono dum la Internacia Librofoiro en Havano kaj en aliaj provincoj kaj adekvatis ĝian enhavon al la kubaj bezonoj.

*Seminarioj pri Informado:* Partoprenis la provincan seminarion en Havano kaj la apartan kunsidon pri ĝi kaj aliaj temoj kun aktivuloj de Ciego de Ávila.

*Novaĵletero e-informoj.* Aperis du numeroj. La reago al ĝia apero estis nula kaj la malfacilaj financaj kondiĉoj aperintaj komence de la jaro bremsis ĝian pluan aperigon. Plurfoje la estraro menciis la gravecon de tia ligilo, sed ĝia efektivigo ne fine konkretiĝis.

Farendas realigi la taskojn planitajn en la laborplano 2003. Informoj pri la kuba kaj internaciaj E-movado mankas en la kuba gazetaro. Same okazas rilate al la apero de kubaj informoj en la internacia E-gazetaro.

Menciindas informoj verkitaj de amikoj de Kubo en i.a. *Internaciisto, Le travailleur esperantiste* kaj *Sennaciulo*.

***Enpaĝigo kaj ekspedo de* Avanco:** Partoprenis la konceptadon de la planataj numeroj, sed ĝis nun aperis neniu. Unue pro la menciitaj financaj malfacilaĵoj komence de la jaro. Por februaro oni planas sendi al la presejo du numerojn por kompletigi la kolekton de la jaro 2003.

***Eldonplano:*** Restas sama kiel pasintjare. Aldoniĝis lastatempe esearo de Juan L. Besada Toledo, kiun oni planas nun eldoni por la 6-a TAKE.

***Biblioteko.*** Ankoraŭ ne finiĝis la klasifa laboro. Mankas tamen tre malgranda parto. La ekfunkciigo de la sideja biblioteko estis plurfoje traktita en estrarkunsidoj. Lasta solvo al la problemo ne estis trovita.

***Filio Guantánamo.*** Tenis retpoŝtan kontakton kun la prezidanto de tiu filio kaj informiĝis pri ĝia evoluo ankaŭ pere de estraranoj vizitintaj la teritorion.

***Filio Cienfuegos.*** Kontaktis kun tieaj aktivuloj kaj cirkuleris al dudeko da iamaj lernantoj. Kelkaj montriĝis interesitaj.

Kontaktis telefone kun Bárbara Borrell, kiu akceptis transpreni la taskon de loka delegito. Laŭ ŝia peto prezentis proponon al la NE por letero sendota al la provinca direktoro pri kulturo kaj al la direktorino de la provinca biblioteko.

***LKK 6-a TAKE.*** Partoprenis la laborkunsidojn kaj respondecas pri kelkaj eldonoj, i.a. la Kongresa Libro kaj prelego.

***Aliaj.*** Tradukas por la interreta E-eldono de *Le Monde Diplomatique*

### 8. Estrarano pri Disvastigo kaj Kulturo

Dum la jaro ni starigis kaj daŭrigis kontaktojn kun estraranoj kaj aktivuloj tra la lando per telefono, leteroj, telegramoj, ktp. En Pinar del Río ni kontaktis Maribel Oliva kaj Osnier celante malfermon de kurso tie, tamen la rezulto ne estis fruktodona. Ni ankaŭ sendis leterojn al aliaj esperantistoj sed ili ne respondis.

Pluraj estis la alvokoj kaj kontaktoj kun la esperantistoj de Pedro Betancourt, Matanzas, por organiziĝo de la movado sed la fakto ke Raúl Rodríguez elektiĝis en alia municipo, ke lia patrino Clara Elsa malsanas kaj ke José de Jesús Campos ne laboras tie, ne helpis. La aliaj esperantistoj ne pretas transpreni la respondecon. José de Jesús Campos instruas al infanoj kaj daŭre utiligas la lingvon tradukante infanliteraturon.

Ni prelegis pri Esperanto al la laboristoj de la hotelo Sandals Royal Hicacos en Varadero en kunordigo kun s-ro Carlos Ernesto. Ni ankaŭ atentas interesitojn en urbeto Santa Marta ĉe Varadero.

Kvankam malrapide, la esperantistoj de Cienfuegos iel organiziĝis danke al niaj kontaktoj kun Bárbara Borrell kaj Galo kaj ankaŭ kiel rezulto de la agado de s-ro Norberto Díaz Guevara kiu eĉ vizitis la provincon kaj renkontiĝis kun kelkaj tieaj esperantistoj. Post la Internacia Homeopatia Kongreso, s-ro Isao Carneiro, esperantisto el Brazilo vizitis Cienfuegos kaj renkontiĝis kun Bárbara Borell kaj aliaj esperantistoj.

Kelkaj iamaj aktivaj esperantistoj de Villa Clara respondis al la letero sendita al ili dum marto kaj ni daŭre kontaktas ilin. Ni devos pli forte labori por organizi la tiean esperantistaron.

Klopodoj por restarigi la grupon de Las Tunas ne mankis sed s-ro Raimundo havas malfavorajn kondiĉojn por entrepreni la tas-

kon. Ni devos serĉi alian aktivulon por atingi tiun celon.

Estaj kelkaj esperantistoj en Insulo de Junularo kaj oni instruas la lingvon tie sed mankas pli da kontaktoj inter ili kaj ni cele al reviglîĝo de la laboro.

La grupo de Ciego de Avila pli stabiliĝis dum la periodo. Du esperantistoj el la grupo ricevis seminarion gvidata de naciaj estraranoj en la nacia sidejo dum aŭgusto.

Nuntempe ili instruas Esperanton en urbo Ciego de Ávila. Nuntempe kelkaj interesitoj de provinco Havano lernas Esperanton pere de la perkoresponda kurso. La esperantistoj de la ceteraj provincoj daŭre laboris kaj agis favore al Esperanto.

En Guantánamo ili vigle agadis, disvastigis Esperanton kaj rilatiĝis kun la socia vivo. Pasintdecembre ili tre bone organizis la tradician nacian renkontiĝon omaĝe al la naskiĝdato de Ludoviko L. Zamenhof.

La movado en Santiago de Cuba stabile marŝis kaj ili havis elstaran partoprenon en la Internacia Librofoiro okazinta tie, kaj la metiejo Kulturo kaj evoluo.

En provinco Granma multobliĝis kaj disvastiĝis pere de la perkoresponda kurso kaj la daŭra informo al la ekstera publiko pere de radioprogramoj.

La esperantistoj de Holguín iom pli organiziĝis, iliaj kontaktoj kun la nacia estraro oftiĝis.

En Camagüey, oni ankaŭ stabile laboris ligante la asocian agadon kun la socia vivo. Ili prelegis pri Esperanto, muntis ekspozicion kaj plifortigis la agadon en municipo Cascorro. Ili aktive partoprenis la kulturan semajnon de tiu municipo.

La grupo de esperantistoj de Sancti Spíritus sukcesis havigi al si retpaĝon pere de kiu ili informas pri sia daŭra agado al la internacia E-komunumo.

La esperantistaro de Urbo Havano okazigis plurajn aranĝojn laŭ trimonataj programoj por plifortigi la movadon. Sabataj aranĝoj, Esperantistaj teoj, prezentado de dokumentfilmoj, dimanĉaj rondoj, ekskursoj, ktp. vivigis la movadon dum la jaro.

Vizitoj de naciaj estraranoj al provincoj por partopreni eventojn, seminarii kaj kontroli la faritan laboron helpis disvastigi la movadon. Ankaŭ vizitoj de alilandanoj kontribuis al plifortigo de nia agado. Dum la jaro, la naciaj estraranoj vizitis la filiojn Guantánamo, Santiago de Cuba, Holguín, Granma, Ciego de Ávila kaj Sancti Spíritus. En ĉiuj kunsidoj de la nacia estraro oni analizis la agadon en filioj kaj venis al pluraj interkonsentoj por helpi kaj stimuli itun laboron.

## 9. Kulturo

Kulturo estas ĉefa laborsfero de nia asocio. Pro tio estraranoj kaj aktivuloj dum la tuta jaro klopodas disvastigi la historion kaj kulturon de nia lingvo kaj ties movado en diversaj eventoj okazintaj en nia lando por ke la ekstera publiko informiĝu pri Esperanto kaj en la aranĝoj ene de nia movado por ke la membraro pli konsciiĝu pri la kulturaj valoroj de la lingvo.

Por plenumi tiun celon, ni partoprenis dum 2003 en la Internacia Librofoiro en Urbo Havano kaj Santiago de Cuba kaj en la librofoiro de Dominika Respubliko okazinta en majo. Ankaŭ oni muntis ekspozicion en Camagüey kaj en Urbo Havano, prelegis en Varadero kaj Camagüey, utiligis la servojn de la municipa biblioteko de Santiago de Cuba kaj tiu de Guantánamo kaj seminariis la aktivulojn en kelkaj provincoj tra la lando. Radiostacioj, kulturaj institucioj, niaj aranĝoj kaj niaj kursoj ankaŭ estis spacoj por disvastigi tiun laboron. Menciidas la laboro de la stabo de Radio Havano Kubo tiucele kaj la agado de la artistoj kaj verkistoj de la asocio kiu daŭre pliriĉigas la E-kulturon. Ni daŭre flegis kaj stimulis la agadon de niaj artistoj kaj verkistoj.

Okaze de la 24-a datreveno de la asocio, oni faris aranĝojn en kelkaj filioj. La ĉefa aranĝo okazis en la sidejo de KEA en Centro Habana kun la partopreno de pluraj esperantistoj.

Dum 2003 nur okazis nacia renkontiĝo en Guantánamo pasintdecembre; lokaj renkontiĝoj okazis en la diversaj filioj kiu stabile laboras.

Nia membraro aktive partoprenis la kulturkleran vivon de la diversaj komunumoj tra la lando. Oni daŭre flegis la kulturiĝon de nia membraro per sendado de libroj kaj alispecaj materialoj al provincoj.

## 10. Utiligo

La eldonado de *Avanco* alfrontis gravajn problemojn, kaj financajn kaj organizajn; kaj realajn kaj subjektivajn, kvankam finfine oni eltrovis solvon kaj ĝi reaperos dum tiu ĉi jaro. Tamen, mi altiras la atenton al tio, ke se ne estos sufiĉa, ĝustatempa kaj serioza kunlaboro, ni ree alvenos al la samaj problemoj. Kunlaboraĵoj el provincoj preskaŭ ne ekzistas, kaj kiel preskaŭ ĉiam la redaktoro devas redakti la plej grandan parton de la bulteno.

Retlisto por diskutoj pri E kaj komputiko velkis kaj finfine mi devis forigi ĝin. Ne estis intereso.

KEMA estas mortinta; oni bezonas novajn membrojn. Dum la jaro d-rino Carmen Aleida ne povis tro fari pro gravaj personaj problemoj, kaj mi mem ne estis kapabla eltrovi manieron revigligi ĝin. Ni havas la esperon, ke post TAKE la intereso revekiĝos. Mi devas konfesi, ke mia laboro ĉi-punkte ne estis trafa.

Dum la jaro pri provis sensukcese kontakti kelkajn fakajn asociojn cele al starigo de kunlaborado. Ŝajne neniu, aŭ preskaŭ neniu fakasocio vere laboras, aŭ pretas kunlabori kun aliuloj. La unusola, kiu respondis al mi estis EVA, per demando, ĉu iu el niaj membroj estas elstara verkisto.

Ankaŭ mi iom okupiĝis pri informado, ĉefe pri TAKE, kvankam ne temas pri mia ĉefa tasko, kaj partoprenado en retaj diskutlistoj (Akademio, Debian-Esperanto, UEA-membroj, ktp.)

Mi zorgis pri kunredaktado de la programo de la 6-a TAKE (kune kun Juan Ramón).



*Komitatanoj kaj invititoj partoprenintaj la 21-an Komitatkunsidon, (Havano 2004.01.23-24). Apudeco al la sidejo de KEA kaj komforto de la kunsidejo estis decidaj por la fruktodona laboro.* Foto: Callenes.

Ankaŭ mi pretiĝis aŭtomatan respondilon por ke retontoj ricevu la ĉefajn dokumentojn kaj informilojn pri la evento.

Mi faris la demarŝojn, kiuj kulminis per la presado de la telefonkartoj surhavantajn la bildon de Zamenhof kaj propagandon pri la 6-a TAKE. La ideo venis el s-ino Niurka Alonso, iama estraranino, kiu laboras en ETECSA.

La demarŝoj estis sufiĉe longaj kaj ni bezonis nian tutan konvinkokapablon por sukcesi. Rezulte de tio, estiĝis novaj eblecoj por nia Asocio.

Dum la jaro mi peris sendadon de libroj por, ekzemple, biblioteko de KEA kaj s-ro Salazar el Cascorro, plus plia sendado kiu fine ne alvenis en nian landon.

Dum la jaro mi devis kombini la laboron de estrarano kun tiu de ĉefdelegito. Parto de mia laboro estas teni ĝisdatigitajn la informoj pri la IM kaj FD de UEA nialandaj.

Mi sukcesis havigi al nia asocio pliajn fakdelegitojn, nome s-ro Julio César Tamayo, (SCU); d-ino Carmen A. Hernández, (CHA), s-ro Juan Ramón Rodríguez, (CHA); s-ro Julio Martínez Fiallo, (CHA) kaj firmigi la situacion de aliaj, ekzemple de s-rino Rosa Castañeda. Ankaŭ mi sukcesis atingi rean aliĝon (tra Fondaĵo Canuto) de s-ino Yoandra Rodríguez, s-ro Julián Hernández kaj s-ro Enrique Pedroso Piñero, kiuj ree estos IM.

Okazas, ke ĉar kubanoj estas subvenciitaj de Fondaĵo Canuto, ni devas montriĝi aparte viglaj kaj aktivaj por ke oni ne nuligu la membrecon en UEA. UEA ne aŭtomate remembrigas ĉiujn IM, nur tiujn kiuj esprimas la deziron daŭre esti membroj, kaj estas aktivaj. Estas drasta malaltiĝo de la membronombro en la jaro 2003 kompare al 2002.

Pro tio mi alvokas al aktivado, ĉar nur tiukaze mi havos argumentojn pledi por estontaj membrigoj.

Ĉiuj provoj ricevi la liston de UEA-membroj, cele al invidua kontrolo kaj kontaktado por ebla propono je fakdelegiteco fiaskis dum 2003, kaj nur ĉi-januare mi ĝin ricevis.

Pliaj proponoj por fakdelegiteco estas Julián, Marta, Manolito. Tiuj, kiuj estas membroj de KEA kaj deziras proponi sin kiel fakdelegitojn, bv. kontakti min.

## 11. Estrarano pri Instruado

Dum tiu ĉi jaro nia laboro naciskale ne estis bona, eĉ en kelkaj provincoj ni ne malfermis kursojn ĉar neniu enskribiĝis. Estas multaj malfacilaĵoj precipe ĉar multaj provincoj ne havas sidejon kaj tio efikas negative. Tamen ni diplomigis kelkajn gelernantojn.

***Perkoresponda kurso.*** Petis informojn 34, el ili pagis 16 kaj ricevis la materialojn. Okazas ke multaj finintoj ne restas en la movado ĉar ili ne havas intiman kontakton kun la movado en siaj respektivaj provincoj.

Elstariĝas provinco Granma, kvankam ili vere ne havas perkorespondan sed renkontiĝan kurson. Ili regule kunsidas, instruas kaj la gelernantoj aktive partoprenas la asocian vivon. La rezulto de tiu ĉi provinco estas tre bona.

Partoprenis seminariojn pri aktivulaj trejnadoj. Ni ne bone atentis la ILEI-sekciojn de la diversaj provincoj, kvankam ni konsideras ke ili ne tiel bone funkcias, teorie ili estas kreitaj sed en la praktiko neniu sekcio funkcias aŭ se ili funkcias, ne informas kion ili faris.

## TRA LA FILIOJ

### SANCTI SPÍRITUS

La perlo de la krono je informado en Interreto pri KEA kaj la movado en Kubo daŭre restas en tiu ĉi provinco. La paĝaro translokiĝis al loka servilo kaj ricevis vizitojn el pluraj mondopartoj. Ankaŭ la esperanta versio de la paĝaro de la radiostacio zorgata de Norberto Díaz Guevara ricevis gratulmesaĝojn kaj multajn vizitojn el diversaj mondopartoj. Ĝi restas unu el la plej solidaj kaj stabilaj aferoj en la laboro de la

movado provinca. Tio rezultigis tre bonajn rilatojn kun la respondeculoj de la radiostacio.

Rilatoj kun MINJUS daŭre estas bonaj. Gravaj problemoj restas: la papera bulteno *Jajabo* alfrontas gravajn problemojn, kaj necesas aliigi ĝian enhavon, kiu jam estos en rekta rilato kun la agado de la filio, kaj aparte fiksi la aperritmon.

Oni ne rezignas pri ĝi, sed devos elpensi solvojn. Ĝeneralan asembleon oni ne povis okazigi pro manko de membroj. Nur 10 membroj kotizis dum la jaro 2003. La perkoresponda kurso daŭre stagnas.

Denove pruviĝas, ke la estonteco de la movado ne tiom dependas de la aliĝo al kursoj, kiom de la reteno de la diplomintoj. En januaro oni malfermis kurson kun 20 lernantoj, el kiuj restis nur unu en la movado. Laboro ne mankis, sed en vero la kondiĉoj ne estas favoraj, do oni ne malfermis la planitan februaran kurson. Tamen, la nova lernantino notinde aktivis.

## CAMAGÜEY

Ĉiuj ordinaraj kunsidoj okazis. En la monato septembro malfermiĝis ekspresa, baza kurso en konvena klasoĉambro en la sidejo de Instituto pri Gastronomio kaj Komerco.

En la kadro de la aprila, kultura semajno de Guáimaro oni profitis la ŝancon ankaŭ okazigi Renkontiĝon pri Apliko de Esperanto en la Komunumo (RAEK) kun Seminario pri Aktivula Trejnado, ĉeeste de reprezentantoj de la municipa instanco de MINCUL. Ekspozicio en la muzeo, muntita de s-ro Salazar, ankaŭ vekis atenton pri la afero. Oni okazigis en septembro la unuan E-renkontiĝon; ili estas monataj renkontiĝoj kun instrua fono. La membraro en la filio atingis la nombron 42.

## GUANTÁNAMO

La filio daŭre flegas rilatojn kun la Provinca Biblioteko, Komunuma Kulturo, ICAP, kaj instancoj municipaj de Popola Povo kaj Pionira kaj Junulara unuiĝoj. En la Provinca Biblioteko oni partoprenis diversajn metilaborojn dum la kutimaj vendredaj ĉeestoj. Dum la festo pri Guantanama Stilo estis montrita E-ekzpozicio, kaj dum decembro oni okazigis Nacian Metilaboron pri la vivo de d-ro Zamenhof.

La filio daŭre peradas donacsendadojn por hospitaloj, handikapitoj kaj maljunuloj. Tio kontribuas al la prestiĝo de la E-movado kaj bone efikas propagande.

Ne sufiĉas, ke ni estu progresemaj; oni devas sciigi la ekstermovadan mondon pri tio...

La bona stato de la financoj montriĝis en tio, ke fine de la jaro oni havis en kaso la sumon de CUP 693.48. La filio havas nuntempe 57 membrojn, el kiuj du estas membro-subtenantoj. En la kursoj je unua kaj dua niveloj sukcesis po 8 lernantoj, dum nur 1 el 3 komencantoj finis la PKK-on.

## SANTIAGO DE CUBA

La provinca filio profitis la bonajn rilatojn kun lokaj radiostacioj por diskonigi pri la ĉeesta kaj perkoresponda E-kursoj. Ankaŭ oni sukcesis aperigi informon pri tio en la ĵurnalo *Sierra Maestra*, grava atingo ĉar estas konate ke mankas spaco eĉ por "normalaj" novajoj en la gazetoj.

La Seminario pri Aktivula Trejnado (februaro) okazis en la teatro de Infanhospitalo Suda, ĉeeste de la Ĝenerala Sekretario de KEA.

Dum marto reprezentantoj de la filio partoprenis prelege la 4-an Metisesiojn "Kulturo kaj Disvolvo" en la Teatro Heredia, kie ili poste ankaŭ partoprenis la 12-an Internacian Librofoiron kun bona publika ĉeesto.

Denove la Infana Festivalo estis krono de la respondeco de la provinca filio, kaj la rezulto rangis inter la plej bonaj movadaj atutoj. Tamen, estas gravaj problemoj rilate al la agado de la municipa filio kaj municipaj grupoj: en Contramaestre ne ekzistas vera E-vivo pro manko de viglaj gvidantoj, en Palma Soriano la afero samas, en II Frente la grupo disiĝis malgraŭ tio, ke dum la unua semestro 10 lernantoj finis specialan kurson ĉiusabatan gvidita de samideano Gonzalo Collantes kaj daŭriga kurso komenciĝis por ili. Ankaŭ vanuis la esperoj pri

eventuala instruisto en Mayarí Arriba, ĉar la kandidato alfrontis laborajn malfacilaĵojn. La estraro de la municipa filio Santiago de Cuba ne bone rilatas al la provinca, kaj oni vere ne scias, kiel statas la aferoj tie. La membraro fine de decembro 2003 atingis la nombron 212.

**GRANMA**

Danke al la bonaj rilatoj kun la lokaj instancoj je la Ministerio pri Kulturo jam funkcias sidejo kun du oficejoj en la teraso de la Kulturdomo en urbo Bajamo, kvankam mankas kaj aranĝoj kaj kondiĉoj. La regula kurso ne bone funkciis: nur du lernantoj (unuanivelaj) ĉeestis ĝin. Nur du lernantoj diplomiĝis; unu el ili el la perkoresponda kurso. La financa flanko ne bone aspektas, ĉar ne videblas kiel enkasigi por Esperanto.

La grupo en Bajamo alfrontis estrarajn problemojn kaj rezulte de tio ne estas tro da entuziasmo tie. Jam ili okazigis sian asembleon kaj elektis novan prezidanton. La situacio ĉe la municipa grupo Río Cauto samas: ankaŭ tie la laboro ne efikas pro tio. En Bartolomé Masó la delegito rezignis. La malo okazas en Jiguaní: tie nia afero bone iras. Delegito en municipo Media Luna garantiis kreskadon de la membraro. En la aliaj municipoj agas la perkoresponda kurso kaj unuopaj esperantistoj.

Rezulte de tio la membraro kreskis de 93 al 125 homoj. Tamen, la kvalito de la lernomaterialoj por la perkoresponda kurso kaj nesufiĉa stimulo flanke de la respondeculoj forte bremsas la aferon: oni estus povintaj fari multe pli. 78 membroj apartenas al la perkoresponda kurso.

En la radia medio la afero alias: la filio havas apartan rubrikon en du programoj de la stacio Radio Bajamo, kio helpas ne nur diskonigi Esperanton, sed ankaŭ atenti la perkorespondajn kursanojn. Televida intervjuo ankaŭ sukcesis.

**HOLGUÍN**

La filio faris bonan diskonigan laboron pere de la parko "Bona Amiko" kaj partopreno en la radioprogramoj "Signalo" kaj "Populara Apartaĵo". La rilatoj kun la lokaj instancoj de MINJUS kaj MINCUL estas bonaj.

La direktoraro de la lernejo Frank País, kie laboras instruisto Raymond Fonseca, gratulas sin pri lia laboro. La interesrondo "Amiketoj de Esperanto" daŭre antaŭeniras. Malgraŭ ĉiuj klopodoj, ankoraŭ ne eblas starti laboron por E en la municipo Gibara. La filio havas 33 membrojn.

**URBO HAVANO**

Ekde la momento kiam la provinca estraro organizis sin, la etoso pliboniĝis kaj la rezulto tuj videblis, kvankam kompreneble la novuloj devis lerni iom post iom la aferojn.

Ankaŭ dum la lastaj monatoj revenis al la estraroj la malaperintoj el la municipa estraro en Diez de Octubre kaj gajnis lertecon tiuj el municipo Plaza.

Dum la unua semestro aliĝis 37 lernantoj enla unua nivelo kaj 5 en la dua. La superan kurson ĉeestis 5 lernantoj. Tamen en junio restis nur 14 en la unua nivelo. La instruistino malsanis kaj la plimulto el la forlasintoj alfrontis privatajn problemojn.

Dum la dua semestro ne funkciis kurso en la municipo Plaza pro manko de klasoĉambro; en Centra Havano neniu enskribiĝis por la unua nivelo, sed 6 ĉeestis la duan. En municipo Diez de Octubre la partoprenantoj estis respektive 9 kaj 8. En oktobro komenciĝis konversacia kurso.

Bonas ke inter la aktivuloj troviĝas du iamaj naciaj estraranoj, kiuj malgraŭ gravaj privataj problemoj ree partoprenas.

En oktobro oni okazigis Seminarion por Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST 2003). Oni okazigis 64 % de la programitaj kulturaj aranĝoj.

Escepte de decembro, la provinca estraro kunsidis ĉiumonate kiel programite, ne prenante en konsideron la eksterordinarajn kunsidojn.Bremsas la laboron la daŭraj problemoj ĉe la municipa filio Centra Havano. Pro tio, la laboraj rilatoj inter ambaŭ filioj ne estas tiaj, kiaj ili devas esti.

## ĈEFAJ GVIDILINIOJ DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO POR LA JARO 2004

### 1. INFORMADO KAJ ELDONA-AGADO

1.1. Ekstera informado pri E, la internacia E-movado kaj KEA, per la tradiciaj amaskomunikiloj.

1.2. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Por pli vasta komunumo* por varbi kaj grandigi la membraron de KEA.

1.3. Utiligi ĝisdatigitajn informilojn de UEA kaj produkti proprajn pri E kaj ĝia movado por internacia kaj landnivela uzoj, kaj zorgi pri ilia distribuado.

1.4. Produkti kaj eldoni la oficialan organon *Avanco* kaj la informilon de la NE.

1.5. Atenti kaj proponi eldonan planon kongrue kun difinendaj prioritatoj de la Asocio ene de la kulturpolitiko de UEA.

1.6. Kunlabori aktive por starigi kaj regule aktualigi la retpaĝon de Radio Havano Kubo, tiel ke ĝi provizu informojn pri E kaj KEA. Atenti la jam ekzistantan kaj stimuli la kreadon de aliaj hejmpaĝoj tra la tuta lando.

### 2. EVENTOJ

2.1. Okazigi la 21-an Komitatkunsidon de la 23-a ĝis la 25-a de januaro en Urbo Havano.

2.2. Okazigi la 6-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto (Havano, 21-a ĝis 27-a de marto).

2.3. Omaĝi tutlande la 25-an datrevenon de KEA.

2.4. Okazigi provincajn seminariojn pri aktivula trejnado en Santiago, Granma, Urbo Havano, Guantánamo, Holguín kaj Camagüey .

2.5. Partopreni la 89-an UK-on kaj ILEI-Konferencon en Ĉinio.

2.6. Okazigi la 3-an Tutlandan Kulturan Infanfestivalon (Guantánamo, somere).

2.7. Okazigi nacian metiejon Zamenhof-tago (Guantánamo, decembre).

### 3. DISVASTIGO

3.1. Daŭre labori por aktivigi la movadon en Pinar del Río, Havano, Villa Clara, Cienfuegos, Matanzas, Junulara Insulo kaj Las Tunas

3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Camagüey, Urbo Havano, Sancti Spíritus, Holguín, Ciego de Ávila, Santiago de Cuba, Granma kaj Guantánamo.

### 4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo unufoje jare

4.2. Atento kaj kontrolvizitoj al filioj.

4.3. Sendado de KEA-informiloj al membroj-subtenantoj.

4.4. Flegi la informan fluon al la Komitato. Partoprenigi komitatanojn en la ordinaraj estrarkunsidoj.

### 5. FINANCOJ

5.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj.

5.2. Kontroli la plenumon de la buĝetoj de KEA en CUP kaj USD.

5.3. Atenti kaj kontroli la filiojn kun emfazo en la konscio pri memfinancado kaj travideblo en ĉiuj niveloj.

5.4. Kontroli kaj prizorgi la libroservon kaj labori por kreskigi ĝian stokon. Flegi ties efikan funkciadon.

### 6. INSTRUADO

6.1 Flegi la okazigon de diverstipaj kursoj tutlande kaj kontroli ties kvaliton metodologie kaj lingve. Garantii la bazajn lernomaterialojn

6.2 Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Por pli vasta komunumo* por varbi interesitojn kaj kreskigi la kvanton da lernantoj en la diversaj kursoj, speciale en la Perkoresponda Kurso.

6.3. Revigligi la kategoriigon de membroj kaj utiligi ĝin kiel kondiĉo por decidi pri

partoprenontoj en eventoj.

6.4. Flegi la instruan rolon de la oficiala organo de KEA.

6.5. Kontroli kaj atenti la instruistaron (ILEI-Sekcio) metodologie kaj lingve.

6.6. Flegi la rilatojn kun ILEI kaj laŭeble partopreni ties edukan projekton *Interkulturo*.

## 7. PUBLIKAJ RILATOJ

7.1. Daŭre flegi la rilatojn kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo.

7.2. Plifortigi la rilatojn kun la rilatorgano. Flegi la korektan plenumon de la Normoj de rilatoj.

7.3. Plifortigi la rilatojn kun UN-Asocio kaj UNESKO-Komisiono per konkretaj planoj aŭ projektoj (Karibio kaj KEA), kaj Asocio de Lingvistoj.

## 8. INTERNACIAJ RILATOJ

8.1. Daŭre flegi la kontaktojn kun UEA, landaj asocioj (aparte kun la amerikaj), internacia E-Instituto kaj kluboj.

8.2. Plifortigi la solidarajn rilatojn kun landaj asocioj, kluboj kaj amikaj organizaĵoj. Aparte flegi la rilatojn kun FEL kaj La Amikoj de Kubo.

## 9. KULTURO

9.1. Kontroli kaj atenti la kulturajn programojn de la asociaj aranĝoj kaj eventoj. Flegi la reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj.

9.2. Stimuli la partoprenon en eksterasociaj eventoj kulturaj kaj klerigaj.

9.3. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Savi esperantaĵojn* kun la celo prizorgi kaj savi historie valorajn esperantaĵojn en niaj bibliotekoj. Atenti pri la korekta utiligo de la bibliotekoj tutlande.

9.4. Stimuli la filiojn okazigi lokajn kaj regionajn kulturklerigajn aranĝojn.

9.5. Kontroli kaj atenti la kulturan programon de la 6-a TAKE.-

9.6. Aktive partopreni la kulturklerigan vivon de la komunumo per konkretaj programoj /eventoj.

## 10. UTILIGO DE ESPERANTO

10.1. Starigi aŭ plifirmigi kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj pri medicino, turismo kaj aliaj, laŭ la prioritatoj.

10.2. Daŭre informi kaj stimuli la membraron pri utiligo de E en Scienco kaj Tekniko. Atenti la okazigon de fakaj renkontiĝoj.

10.3. Atenti informpetojn de interesitoj viziti Kubon. Publikigi turismajn informojn pri Kubo.

10.4. Instigi partoprenon de la Asocio en eventoj de fakaj institucioj per konkretaj programeroj.

10.5 Prepari lokajn esperantistojn ekde informa kaj lingva vidpunktoj por atenti alilandajn vizitantojn.

10.6. Prizorgi la turisman programon de la 6-a TAKE.

**Rimarko**: La Ĉefaj Taskoj de KEA daŭre estas la gvidlinioj de la Asocio kaj enhavas difinitajn aspektojn celantajn la plenumon de la ĝenerala laborplano por la periodo 2001-2004, aprobita en la 18-a sesio de la Nacia Komitato, en la jaro 2001. Ĝi entute kongruas kun la celoj de la Strategia Laborplano de UEA por la periodo 2001-2010.

Avanco
**Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio**
(1/2004)
Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, 10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484; 53 9102;
Fakso. 649 8729; kubesp@enet.cu
Ĉefredaktoro:
ALBERTO GARCÍA FUMERO
Revizias kaj kontrolas:
MARITZA GUTIERREZ GONZÁLEZ
Enpaĝigas:
ALBERTO FERNÁNDEZ-CALIENES

www.esperanto.net

avanco

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

**Kuba Esperanto-Asocio**
Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484, 53 9102, Fakso 649 8729
kubesp@enet.cu

Cirilo Ramos Piñeiro
Velazco No. 3 entre Ursula y Sevillano
Rpto. Sevillano, Diez de Octubre
10500 Ciudad de La Habana

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro